Jubilea kunveno
Alsóör Hungario
26a-27a junio 2010

Eŭropo Demokratio Esperanto

# Raporto

**La 26an kaj 27an de junio 2010 okazis en Alsóörs, Hungario, unuafoje en la historio de EDE federacia kunveno kun reprezentantoj el ĉiuj tiamaj ekzistantaj landaj sekcioj (Francio, Germanio, Hungario, laŭ fondordo) kaj ankaŭ reprezentantoj de la tiam kreota pola sekcio. La polan sekcion efektive oni fondis la 7an de julio 2010. Ankaŭ notinde ĉeestis fondunto de kataluna aŭ hispana sekcio.**

**Tiun unuafojan kunvenon, ampleksa laŭ la diverseco de landoj reprezentitaj partoprenis :**

## Francio

**Bertrand HUGON** prezidanto de la federacio
**Fabien TSCHUDY** sekretario de la federacio

## Germanio

**Monika FINNEGAN-REUSS** kasistino de EDE-Germanio
**Konrad GRAMELSPACHER** konsiliano de la federacio, prezidanto de EDE-Germanio
**Eugen MACKO** vic-prezidanto de la federacio kaj de EDE-Germanio, konsilisto pri Germanujo kaj orientaj landoj

## Hispanio

**Guillem GÓMEZ BLANCH** (federacia politika konsiliano)

## Hungario

**Andrea RUZICSKA** konsiliano de la federacio
**Thierry SALOMON** konsiliano de la federacio
**Géza SCHULER** estrarano de EDE-Hungario
**Péter TIHANYI** membro de EDE-Hungario
**Balázs WACHA** konsiliano de la federacio

## Pollando

**Franciszek WITUCKI**
**Kazimierz KRYZAK**
**Eduardo KOZYRA**

La celo de la renkontiĝo en Alsóörs estis ĉefe paroli pri kian programon havu la eŭropa EDE. La ideoj eldiritaj en Alsóörs certe ne konsistigas ion definitivan sed estas laborbazo por plu prikonturi la enhavon de la programo de EDE. Renato Corsetti, konsiliano de EDE-Eŭropo, akceptis esti redaktoro de la teksto, pri kies pluevoluigo respondecas la konsilio. La membroj ankaŭ rajtos intertempe partopreni ĉe interreto en maturigado de la teksto kaj pri la fina teksto, ili povos voĉdoni. La Eŭropa EDE-programo ne celas trudiĝi al la landaj sekcioj, ĝi nur montros gvidliniojn. La landaj sekcioj povos ene de ĝi pliemfazi, plidetaligi, malemfazi tiun aŭ jenan enhaveron laŭ sia interespunkto dum balotkampanjo. Tamen oni trovu interkonsenton por verki tekston subtenatan de ĉiuj el ili.

# Enhavtabelo

La semajnfino komenciĝis per prezento kaj historio de la diversaj EDE-landaj sekcioj, kies nombro nun egalas kvar kiel jure agnoskitaj. Poste, okazis diversaj diskutoj, kiuj esti jenaj:


La evoluo de la politika konscio en Esperantujo.
Kion atingis EDE ĉe la ĝenerala publiko ? .....................................................................p. 3

Kion la landaj sekcioj esperas de la federacio? ............................................................p. 3
- Pri interna politiko
- Pri interna kunlaborado
- Sur la komunikada kampo

Kien EDE disvastiĝu? ..................................................................................................... p. 4

Kiel informi pri EDE ?...................................................................................................... p. 5

Kiom ampleksa estu la programo de EDE ..................................................................... p. 6

Skizo de komuna bazprogramo ....................................................................................... p. 6

Ĉu kandidatiĝi por aliaj balotoj ol la eŭropaj? ................................................................ p. 9

Diversaj aferoj ................................................................................................................ p. 9
- Pri kiel prezenti niajn ideojn
- Pri eŭropa identeco
- Pri internacia demokratio

Kromdokumentoj ............................................................................................................ p. 11

- Serĉo de politika modelo per Kontinento en krizo (teksto de Guillem Gómez Blanch)
- Ĉu nova tegmento por la EDE-programo? (teksto de Fabien Tschudy)

## 1.) La evoluo de la politika konscio en Esperantujo kaj kion atingis EDE ĉe la ĝenerala publiko?

**Sinteno de la ĝenerala e-movado al EDE:**

Se en la esperanto-movado, EDE ŝajne estas konata tuteŭrope se ne tutmonde, tamen kompreneble, EDE ne havas la tutan esperantistaron ĉe sia flanko, En Hungario ekzemple preskaŭ ĉiuj esperantistoj konas EDE, sed preskaŭ ĉiuj kontraŭas ĝin kaj ĉian politikan agadon. Tie, iuj homoj kontraŭas sen koni, apenaŭ frazo dirita, ili estas oponantoj. Aliaj ne ŝatas la nomon dum iuj pensas, ke estas malbona agado fari ion novan, ĉar ili opinias ke tio malplifortigas la movadon. La cetera parto estas tiuj, kiuj estas pli malfermaj sed tamen ne aliĝas. Homoj pensas, ke esperanto ne estas politika afero, dum male ĝi profunde estas tia. En Germanio kaj Francio, multaj homoj kiuj antaŭe kontraŭis EDE ŝanĝis poste sian opinion au almenaŭ mildigis sian starpunkton.

**Kia diferenco inter EDE kaj la kutima e-movado**

EDE prezentas novan perspektivon por antaŭenigo de esperanto. Partopreno en balotoj intensigas videblecon de esperanto dum tre mallonga tempo dum la klasikaj landaj asocioj neniel tiel multe agas kaj kunordigas agadon sur tuta teritorio dum tiom mallonga periodo. EDE montras al esperantistoj novan perspektivon por agi kaj iom malŝlosas la movadon. Partoprenanto de la kunveno diris eĉ, ke laŭ li per EDE oni atingas pli ol per la kutima esperanto-movado. Alia opinias, ke en la nuna movado, oni dronas pro tro da sektuloj, verdaj popolistoj kaj hobiistoj. Alispecaj homoj interesiĝas pri esperanto tra EDE ol tra la klasika esperanto-movado. Iuj eĉ ekkonis esperanton dank al EDE kaj eklernas esperanton dum aktivado ĉe EDE. EDE povas helpi, ke la ĝenerala movado ne nur reproduktiĝu laŭ la sama skemo (verdpopolismo) sed evoluigu sian reproduktiĝon pere de novaj homoj kaj celoj. EDE estas nova perspektivo por la movado. Ĝi estas interesa por la minoritatanoj de la movado, kiuj taksas serioze esperanton potenciala oficiala internacia lingvo. Ĝi estas organizaĵo por kutimaj esperantistaj petskribemuloj, kaj nova eblo por altiri tiajn homojn, kiuj ŝatus ekzemple esperanton en lernejoj. Kial ili ne atingu tion politike?

**Kion atingis EDE ĉe la ĝenerala publiko?**

EDE estas konkreta kadro por agi kaj ludas rolon la ĉiu-5-jara laborinstiga balota limdato. EDE sukcesis utiligi la reklameblecojn antaŭbalotajn (TV, gazetoj) eĉ se la informo ne nepre alvenis al tiom da homoj, kiom ni deziris. EDE estas bona tribuno por forigi miskredojn kaj antaŭjuĝojn pri esperanto. Pere de sia agado, EDE-anoj edukas sin al pli granda profesieco kaj la internacia federacia funkciado ebligas havi propran lingvopolitikan starpunkton kaj ni sukcesu postuli tion de eksteraj partneroj por havi seriozajn diskutojn kun ili kaj fini tiun ludon inter potencoj kaj hazardoj. Estas fakto, ke ekstermovadanoj en la koncernaj landoj, ekz. verduloj, scias ke ni ekzistas kaj la ĝenerala publiko povas pensi: nun ekzistas io politika por esperanto.

Por pli bone koni starpunkton de esperantistoj al EDE, estis proponite demandi en la aliĝilo al EDE, se iu ne aliĝas, kial ne, kaj analizi la rezultojn.

## 2.) Kion la landaj sekcioj esperas de la federacio?

Pri interna politiko:

Laŭ partoprenanto, EDE-EU devus havi starpunkton, ĉu oni partoprenu aŭ ne en aliaj balotoj ol la eŭropaj. La federacio disvastigu EDE en aliajn landojn. Partoprenanto proponis, ke EDE-EU havu pli grandan reagivon pri aktualaj temoj traktataj de amaskomunikiloj kaj rapidan sciigon al gazetaro pri komuna starpunkto. Tio ja ŝajnis dezirinda al aliaj partoprenantoj, sed en la nuna stato de EDE, ne ŝajnis eble al ili starigi tian reagivon, havi tiel rapide komunan starpunkton pri ĉio. Havi komunan starpunkton pri ĉio ja ne ĉiam eblas kaj tio postulas multe da tempo kaj energio, dum ni ne disponas je multe da tempo kiam oni reagas al aktualaĵoj kaj ni ne havas tiom da energio por tion serioze fari.
Estis proponite, ke landnivele, oni aliru lokajn partiojn, publikajn agantojn, opiniformantojn kaj demandu reagon pri kio koncernas nian temaron. Oni tiel konstatos kiel ilia vidpunkto kongruas aŭ ne kun niaj ideoj, kaj malkovri ĉu estas fosaĵo inter la postulo de sia starpunkto kaj kion ili efektive faras. Pri tio oni povus poste enlande komuniki.

Pri interna kunlaborado:

Estis proponite, ke la federacio devus strebi al koherigo de la programoj eŭropskale. Ĝi povus peri kaj organizi dialogojn inter la naciaj sekcioj. Ĝi povus listigi evitindaĵojn por komunikado por ke landaj sekcioj ne uzu evitindajn sloganojn, bildojn... La federacio devus havi firmajn kontaktojn kun ĉiuj landaj sekcioj kaj helpi al la landaj sekcioj. La federacio povus helpi en tio, disvolvi manlibron kun argumentaro por esti kapablaj ekzakte argumenti pri la nuna eŭropa politiko. Ĝi ankaŭ povus organizi lernosemajnon por diskuti kaj klerigi pri eŭropaj faktoj.

Sur la komunikada kampo:

La federacio povus kunordigi agadojn kiel budkampajnojn, eŭropskalajn eventojn. EDE provu ekzisti pli en la amaskomunikiloj. Ĝi povus pretigi komunikmaterialon deklinacieblan por la landaj sekcioj. Ĝi devus helpi al koherigo de la komunikĉarto (simboloj, koloroj...).

## 3.) Kien EDE disvastiĝu?

Ĝis nun la EDE-federacia statuto ne ebligas krei naciajn sekciojn en landoj kiuj ne membras en EU. La statutoj datiĝas de 2003 kaj el multaj vidpunktoj, ili estas modifindaj. Proponi novajn statutojn estas tasko de la federacia estraro. Preter tiu statutrilata problemo, kien oni ŝatus ke EDE havu landajn sekciojn kaj kion ni faru konkrete por disvastigi EDE en tiun aŭ jenan landon?

**En orienteŭropajn landojn:**

En tiuj landoj estis ĉiam forta movado. Nun, esperanto tie iom stagnas, sed kio restis ĉe la movado kaj nun plu evoluas, estas ke oni ne plu nepre per esperanto celas tien allogi turistojn el okcidenta Eŭropo, sed oni pensas pri esperanto pli serioze el lingvopolitika vidpunkto. Post kelkaj jaroj venos Kroatio en EUn. Tie estas bonaj esperantistoj kiuj interesiĝas pri nia afero. Por Bosnio kaj Hercegovino, necesos ankoraŭ atendi ĝis ili eniros en EU. En Slovenio, ni havas Zlatko Tislar kiu apogas nin, eĉ se li havas alian vizion pri tio, kio estas « esti eŭropano ». Eŭropan konscion ni ĉiuj bezonas, sed eŭropan identecon, ni ne bezonas, ĉar neceso ne ekzistas. En Pollando estas 10 enlandaj kaj 2 eksterlandaj EDE-pollandaj aktivuloj. Eble en Rumanio, oni ankaŭ povus trovi agemulojn. En Slovakio kaj Ĉeĥio estas homoj, kiuj interesiĝas pri EDE. En Bulgario, prof. L. interesiĝas pri nia afero. Li estas iomete aĝa, sed se ni helpas, li eble kontaktos junulojn por kunlabori.

**En Belgion**

Apud grava urbo de Eŭropo, en Bruselo, estas grava problemo. Estus interese havi sekcion tie. RM estas belgo kaj membro de la germana EDE-sekcio. Li estas komencanto sed havas bonan rilaton kun politiko ĉar lia patro estis ministro. Nun RM estas emeritulo kaj ŝatus fari ion en Belgio.

**En Aŭstrion**

Tie estis EDE-subtenanto, kiu iam estis agema sed nun li ne plu respondas al mesaĝoj kaj ŝajne eĉ ne plu volas aŭdi ion pri esperanto. Nuntempe, ni ne plu havas kontakton tie. Eble tamen LP el Aŭstrio leginte la raporton de la pola EDE kontaktis polojn por proponi helpon por traduki alvokon, kiun lanĉis EDE-polaj aktivuloj al la eŭropaj parlamentanoj.

**En Svislandon**

Eĉ se Svislando ne estas en EU, Svislando havas multe da rilatoj kun EU. Ĝi estas en la spaco Schengen kaj multe kunlaboras kaj eĉ se ĝi ne integrita en EU mem, ne gravas, la lando estas parto de centra Eŭropo. Svisoj povus interesiĝi pri EDE. Eventuale, eblus tie ke estu memstara EDE kiu povus havi delegiton en la federacio.

**En Brition:**

Simbole, estus bone havi EDE-sekcion en Britio. Estus interesa signalo. Ankaŭ tie troviĝas aliaj lingvoj ol la angla en Skotlando, Nordirlando, Kimrio. Kaj ankaŭ estas lingvaj demandoj en la lando ĉar tie loĝas multaj eksterlandanoj. La angla lingvo pro ties tutmonda fuŝuzado estas difektiĝanta kaj la britoj mem devos baldaŭ

relerni sian propran lingvon sub formo de fuŝangla por komuniki kun eksterlandanoj ĉar malmultaj homoj regas la veran anglan. Havi piedon en Britio estus interese. La problemo estas ke tie estas malmulte da esperantistoj kaj ne multaj apogus la ideon fondi sekcion. Preter la simbolo, oni povas timi ke la balotrezultoj de EDE-Britio estus eĉ malpli granda ol la rezultoj de EDE-Francio aŭ EDE-Germanio. Aliflanke, por voĉdoni favore al EDE, oni ofte devas havi internacian konscion. Ĉar britoj havis grandan imperion, ili eble havas pli evoluintan internacian konscion ol en aliaj landoj. Kaj tie, sufiĉe da intelektuloj havas tian konscion. Cetere, 8 britaj intelektuloj aljuĝis kandidatecon de UEA pri nobelpaca premio. Eble estas bona tempo varbi esperantistojn tie por fondi sekcion.

**En Nederlandon:**

Eble povus kunlabori por krei sekcion JD.

## 4.) Kiel informi pri EDE:

La diskuto restis nur ĉe flugfolio kaj budoj

**Al la esperantistaro?**

Unu ideo estis uzi eĉ du varbilojn: unu por varbi rektajn membrojn kaj unu por varbi sekcifondemulojn. Ili estu en la nacia lingvo. Sed ne aprobis ĉiuj tiun ideon. Estus malfacile ĝenerale klarigi kiel fondi sekcion en ĉiu lando, ĉar la eblecoj estas malsimilaj de lando al alia pro jurkialoj. Alia ideo estis, ke la afero povus okazi en du etapoj. Unue, ni varbu rektajn membrojn (tio estas rekte aliĝintaj federaci-nivele, ĉar ne ekzistas en sia lando nacia sekcio). Estis diskuto pri tio, en kia medio varbi fondemulojn. La plej facila medio estas esperantio. La partio Newropeans havas apogantojn ĉar ili varbas en la medio de iamaj Erasmus-studentoj. Iu internacia partio bezonas disvolviĝi surbaze de jam ekzistanta reto tiel ke estus disvolviĝkernoj pligrandiĝantaj en pluraj landoj samtempe. Sed aliflanke, estas kontraŭekzemploj. Ĝuste pelis al refondo de EDE-germanio en 2008 ne esperantisto, nome Manuel Cebulla. Kompreneble, li tion faris kun aliaj esperantistoj, sed ne estanta esperantisto, li fariĝis prezidanto de EDE-Germanio. Ankaŭ estas li, kiu atingis Eugen Macko por venigi lin en EDE-n. En Belgio ankaŭ estis CC, kiu ne estis esperantisto kaj kiu iumomente deziris krei sekcion, sed li ne trovis kunlaboranton el la esperantista medio kaj poste ankaŭ forlasis EDE. Estis proponite, ĉe la federacia retejo instigeti homojn al kontaktiĝo kun ni (vi interesiĝas pri EDE? Bonvolu kontakti nin kaj ni helpos vin fondi sekcion), sed tio jam pli malpli ekzistas ĉe la laŭlandaj paĝoj de la retejo. Eble povus aperi tio pli klare kiel ĉefmesaĝo sur la hejmpaĝo. Partoprenanto proponis la amuzan sloganon iom pikantan: « Ĉu vi volas danci la bambon aŭ ĉu vi volas ŝanĝi la mondon. »

**Al la ĝenerala publiko?**

Koncerne aliron al la ĝenerala publiko, nun ĉe budoj, EDE-anoj de la hungara sekcio uzas flugfoliojn de la klasika e-movado kaj ene de la konversacio pri esperanto oni enkondukas EDE. Ĉu oni kreu bazan dokumenton federacinivele kaj oni traduku ĝin en la naciajn lingvojn? Sed la federacio ne povus pagi presadon por ĉiu nacia sekcio. Iu proponis eĉ, ke la landaj sekcioj aĉetu al la federacio, sed tiu lasta ne estas tiom riĉa. Kelkaj diris, ke ne indas havi deklinacieblan federacian folimodelon, ĉar ĉiuj landaj sekcioj devos ĉiukaze multe adapti la enhavon. Kio estus interese, kiam landaj sekcioj disponos je nacilingvaj versioj, estos interŝanĝi stokojn por ke ekzemple hungaroj povu ankaŭ en Budapeŝto aliri turistojn en la franca au germana. La federacio povus havi kunordigan rolon.

Estis proponite ankaŭ, ke la federacio instigu pli al surstrata budumado. Oni tiel vere spertiĝas pri kiel paroli pri esperanto el la politika vidpunkto. Laŭ la urbo/lando, la reguloj por budumi ŝanĝiĝas, foje iom pagenda, en Francio senpaga. Sed kutime, ne estas problemstarigaj kondiĉoj kaj la rajtigaj kostoj estas malmultaj. Se ene de EDE ni disvolvas tian budumkulturon, fervoraj esperantistoj budemaj eble venos helpi kaj oni eble eĉ aprezos nin, ĉar ni estos konkrete agantaj kaj ne nenion farantaj. Dum la laborkunveno de EDE en Strasburgo en 2010, EDE-anoj deĵoris 2 horojn ĉe budo ĉe la ĉefplaco, kaj estis sufiĉe impone konstati kiom da homoj interesiĝis kompare kun kio konstateblas ĝenerale ĉe budo ekzemple en laŭtema foiro. Ankaŭ eble rolis tio, ke estis 10 dinamikaj homoj disdonantaj ĉiuflanken flugfoliojn kaj povantaj respondi demandojn. Oni eĉ trovis novan lernantinon por la loka klubo, do EDE-agado havis pozitivan flankefikon por la klasika movado. EDE havas alian manieron paroli pri esperanto ol la kutima movado. Ni ne prezentas esperanton el hobia vidpunkto sed el politika vidpunkto. Pro tio, estas malfacile transpreni la ĉebudajn spertojn de la klasika movado. Oni devas mem alfrontigi nian ide-prezent- kaj trakt- manieron al homo de la strato. Kiu opinias, ke esperanto havas neniun ligon kun politiko certe tuj komprenas, ke en si mem, esperanto estas

politika. Partoprenanto aldonas, ke hodiaŭ ĉiuj sidas malantaŭ sia komputilo dum interpersona fizika interparolado estas ege grava por bonaj rilatoj kun homoj kaj konvinkiĝutoj. Laŭ li, estas ofte manko de esperantistoj. Ili restas inter si kaj ne scipovas kontakti ekstermovadajn homojn.

## 5.) Kiom ampleksa estu la programo de EDE:

Grava demando estas kiom ampleksa estu nia programo. Germanaj ĉeestintoj sciigis, ke ili ne ŝatus ke estu tro da programpunktoj nur pri lingvoj kaj certe ne tro da detaloj pri lingvopolitiko (aĝo por eklerni lingvon kaj kiom da tempo...). Ili ŝatus ankaŭ pli superajn temojn tiajn, kiajn popolvoĉdonon, ekonomion... Laŭlonge de la diskutado, pola ĉeestinto deklaris sin konsciiĝinta pri tio, ke oni devus laŭ li plivastigi la programon al travidebleco, egaleco, sociaj rajtoj, ekologio... sed ke en la unua etapo, oni devas strebi al enkonduko de esperanto en lernejojn. Hungara reprezentanto opiniis, ke ĝis nun, la amplekso de la programo estis malsama inter Francio kaj Germanio: en Germanio estis multe pli da ne lingvaj punktoj. La solvo estus tuŝi per kelkaj paragrafoj la ne lingvajn aferojn sed ne detale kaj nur ĝenerale. Ni ne enprofundiĝu en ekonomirilatajn aferojn, ĉefe se ili estas ekstremaj. En Hungario, oni ŝatus programon centritan ĉe la temo komunikado. Franca ĉeestinto proponis ne tro ampleksan programon, sed tegmentitan de la nocio pri eŭropa civitaneco. Laŭ li, la programo ne respondu la demandon, kien EU iru, sed kiel ĝi tien iras. La ĝenerala sento pri la programo tamen estas, ke ĝi pliampleksiĝu eĉ se ne detale.

## 6.) Skizo de komuna bazprogramo:

El la kunveno aperis 31 programpunktaj proponoj. La 31 ĉi-subaj programpunktoj ne estas deciditaj kaj nur estas laborbazo por plua ellaborado de nia programo. La celo estas fine trovi programpunktojn akcepteblajn en ĉiuj sekcioj. Pri la fina propono voĉdonos ĉiuj membroj de la landaj sekcioj kaj ĉiuj rektaj membroj de la federacio. Ĉiu landa sekcio kaj nia hispana kunlaboranto faris proponojn, kiuj estas ĉi-sube listigitaj. Ili estas klasifikitaj de la plej ŝatataj al la malplej ŝatataj laŭ pritakso de la partoprenintoj mem. La plej alta subteno egalas 13 (la nombro de partoprenintoj) kaj la malplej alta subteno egalas 0. Interparenteze estas skribita de kiu lando venis la propono.

1. Eŭropa perspektivo kaj EU konstruado (Hispanio)**, 13**
La neceso de eŭropa perspektivo estas hela. Estas naive pensi ke izolita lando povus sole batali kontraŭ la krizo. Registaroj devas agi kune, kadre de Eŭropa Unio; politikaj partioj kaj eĉ sindikatoj devas/devos kunordigi siajn klopodojn pri tio. Ni proponas ankaŭ esti favoraj al la konstruado de Eŭropa Unio kiel politika strukturo kiu brakumos la ŝtatojn kaj landojn pere de la federista principo. Ni proponas eŭropan politikan / perspektivan agadon favora al la popolo kaj kontraŭ la detruado de la minimumaj indaj vivkondiĉoj.

2. Enkonduko de Esperanto en la liston de la fremdaj lingvoj en edukadsistemo (Pollando)**, 13**
Ebligi eŭropskale la eblon lerni esperanton en lernejoj, kiel elektebla studobjekto en la edukadsistemo.

3. Klarigi kiel Esperanto protektas lingvan kaj kulturan diversecon (Hungario)**, 13**
Por ni estas evidente, ke esperanto estas rimedo por protekti aliajn lingvojn kaj kulturojn. Oni devas klarigi kial, ekzemple emfazante ke esperanton eblas rapide ellerni, flegante sian gepatran lingvon kaj gardante tempon por lerni du pliajn fremdlingvojn.

4. Respekto kaj postulo pri respekto de homaj lingvaj rajtoj (ĉiuj)**, 13**
La ĝenerala kadro de demokratia politiko estas la difinoj de civitaneco kaj homaj rajtoj. Tiuj estas entenataj en la universalaj deklaracioj de homaj rajtoj kaj eŭropaj civitanoj kaj infanoj. Tiuj estas nia gvidilo.
La ĉefa kaj plej konata teksto estas la Deklaracio de homaj rajtoj de 1948. Ni konsideras, ke ĉiuj postvenintaj kaj postvenontaj tekstoj devas ne proponi forigon de iu ajn punkto el tiu deklaracio ; ties principoj estu superaj kaj ne malhelpeblaj de postaj deklaroj.
Kompreneble tiu starpunkto sopiras sincere al pliaj atingoj de homaro kaj rekonas apartajn tekstojn, kiuj precizigas rajtojn ekzemple por infanoj.

5. Alproksimigi EU-instancojn de la civitanoj (amaskomunikiloj raportu pli ofte pri okazaĵo en instancoj) (Francio)**, 13**
Elturniĝi tiel, por ke oni aŭdu ĉiutage iom de la okazantaĵoj el la eŭropaj instancoj. Eblus eĉ trudi al televidĵurnaloj sed ne nur al ili, procentaĵon el sia elsendtempo por trakti eŭropajn aferojn.

6. Atenti kaj garantii sendependecon de amaskomunikiloj (Francio)**, 13**
La industrio pri informado iĝis unuaranga industrio en la mondo kaj ĝenerale submetita al premo de financaj potencoj. Estas necese samtempe garantii sendependecon de la informoj kun protekto de la ĵurnalistoj kaj malhelpi la mensogajn manipulojn kun ties teruraj konsekvencoj... La principo estas interalie, laŭleĝe trudi al la posedantoj de amaskumunukiloj la kontraŭdiran debaton de la informo.

7. Antaŭenigi liberan kaj malfermitkodan komputikon (Francio)**, 13**
Ni konsideras ke la libereco kaj sendependeco de la ĵurnalistoj kaj la fidindeco de la interŝanĝoj postulas, ke same sendependaj estu la iloj, kiujn ili uzas, alivorte, la 'teknologioj pri informado'. Je tiu spirito ni subtenas la movadon por liberaj bitvaroj (programaroj) petante ties eniron en la edukad-sistemon kaj ŝtatajn administraciojn. Tio ne estis traktita en Alsóörs, sed kial ne ankaŭ fari proponojn por batali favore al la neŭtraleco de la reto: Interreto estas komuna havaĵo, kiun oni ne povas organizi por utili al privataj interesoj.

8. Demokratio/Travidebleco (Francio kaj Hispanio)**, 12**
EDE strebas al demokrateco de la eŭropa publika vivo. Por tio, interalie oni evitu ĉiajn intereskonfliktojn. EDE postulu travideblecon sur la politika, financa kaj scienca kampoj, tiel ke civitanoj havu ĉiujn konindajn elementojn en siaj manoj por prijuĝi aŭ formi opinion.

9. Egaligi la enirrajton en la balotsistemon (Germanio)**, 12**
Le partoprenrajto en eŭropaj balotoj ege varias de lando al lando. Iuj lando postulas pagon de grandega monsumo, aliaj postulas kolekton de foje racia, foje nekredebla kvanto da subskriboj. Tiu varieco de postuloj koncerne partoprenon en baloto estas maldemokrata kaj malutilas al legeblo de la rezultoj. Estas efektive ne eble kompari balotrezultojn inter la diversaj landoj, ĉar la rajton eniri la balotsistemon estas tro malsimila. EDE postulas, ke oni egaligu la rajton partopreni la eŭropan baloton per kolekto de subskriboj laŭ iu promilo (ekzemple 0,1‰) laŭ la enlanda voĉdonantaro. EDE ankaŭ  postulu ke oni samigu la kondiĉojn koncerne aliron al voĉdonil-eldonado. Ĉiuj partinomoj estu sur sama voĉdonilo (pagita de la ŝtato) laŭforme de listo. La balotanto krucas la partion, al kiu ĝi donas sian voĉon. Tio estas punkto pri kio, verŝajne, ĉiuj konsentas inter la EDE-sekcioj, ke la voĉdonrajto estu la sama en ĉiuj EU-landoj.

10. Kontraŭ burokratismo (Hungario)**, 12**
EDE pledas por kiel eble malpliigi burokration en landa kaj eŭropa administracio.

11. Tuteŭropa edukado 10% (Germanio)**, 11**
Eŭropaj leĝoj ebligu, ke 10% de la instrutempo oni dediĉu al komuna tuteŭropa edukprogramo, kies enhavon determinos eŭropa politiko.

12. Uzi novajn edukadoteknikojn kiel interreton (Germanio)**, 11**
Se infano, kiu loĝas en Finnlando sed hejme estas edukata en la kataluna,  per interreto, li/ŝi povus lerni en la lernejo la finnan lingvon kaj poste hejme, per interreto, oni povas instrui lin/ŝin per la kataluna rekte el Katalunio. Oni povus formi etajn grupojn tiajn, por per tiu sistemo respekti hejmlandajn rajtojn.

13. Senlima politiko (Germanio)**, 11**
En EU ni ja havas limojn. Kiam popolo havas la saman problemon ĉe ambaŭ flanko de limo (ekzemple pri jes au ne al ĉelima nova atomernergia centralo), nur duono de la popolo povas voĉdoni pri tiu problemo dum ambaŭ estas koncernataj. Nia propono estas, ke ĉelimaj loĝantoj povu agi pri tio, kio estas proksima de ili, eĉ se en la apuda lando. Oni devas pensi alimaniere, ekzistas landlimo inter homoj, sed oni ne devas dividi la popolojn pro landlimo. Eble por tio, oni kreu pli da translimaj lokaj instancoj.

14. Starigi kondiĉojn favorajn al apero de eŭropa civitaneco (Francio), **11**
EDE deziras, ke homoj estu eŭropaj civitanoj ne nur la balottagon, kiam oni elektas novan eŭropan parlamenton. EDE postulas "starigi kondiĉojn favorajn al apero de eŭropa civitaneco" kaj por tio, oni bezonas komunan lingvon. EDE deziras konstruadon de tuteŭropa publika opinispaco, civitana kaj amaskomunikila. Tuteŭropa civitaneco ebligos al eŭropaj civitanoj komuniki, por kune kunkreski: tiel oni subtenos komunan serĉadon de solvoj por problemoj kaj civitanoj kunlaboros por konstrui plu vivigi tuteŭropan demokration. Civitaneco estas la ebleco por civitanoj agi: ili debatu, ili faru transnaciajn asociojn, ekzistu publika konscio, publika vivo de ideoj kaj de la agadoj de civitanoj, estu transnacia interparolado.

15. Ne al « lingva aristokrateco » (Hungario), **10**
Demokrateco ekzistas, kiam estas dialogo inter civitanoj. Oni nepre evitu, ke nur elitanoj havu alireblon al internacia komunikado per la angla, povantaj pagi eksterlandajn restadojn kaj privatajn kursojn. Mono ne

limigu aliron al internacia komunikado. Eŭropa Unio ne estas aranĝo de elitoj sed unio de civitanoj.

16. Aperigo de juraj dokumentoj kaj ĉefa instrumaterialo en minoritataj lingvoj kaj Esperanto, laŭbezone (Hungario), **10**

Cele al maldiskriminacio sur la jura kaj eduka kampoj, EDE postulas, ke laŭbezone juraj kaj edukadaj dokumentoj ekzistu ankaŭ en minoritataj lingvoj kaj/aŭ en esperanto.

17. Dialogo kun diversaj medioj de kulturo kaj scienco pri transnacia komunikado (Hungario), **10**

EDE dialogu kun esploristoj, fakuloj el kultura kaj scienca medioj pri problemo koncerne transnacian komunikadon.

18. Lingvaj homaraj/hejmlandaj rajtoj, **9**

Pluraj partoprenantoj petis, ke ĉiu rajtu esti edukata en sia lingvo, eĉ en la lernejo. Kiel elitano, dum studado, oni certigas al vi veturi eksterlande por studi, ofte en la angla. Tiun rajton ankaŭ havu normala civitano, aparte kiam li/ŝi havas alian denaskan lingvon ol la landan. Ĉiuaĝa studanto devus havi la rajton studi en la lando, kies lingvon li parolas, por esti almenaŭ parte edukita en sia gepatra lingvo.

19. Lernofaciliga rolo de Esperanto (Pollando), **9**

La programo de EDE emfazu la lernofaciligan rolon de esperanto, tiel pledante por ĝia apero jam en bazlernejo, kiel enkonduko al posta lernado de aliaj lingvoj.

20. Pligrandigo de Esperanto en la amaskomunikiloj (Pollando), **9**

EDE postulu plividebligon de esperanto en la amaskomunikiloj kaj ĝenerala informado pri ĝi.

21. Subteni multlingvismon. Pli da instruado de najbarlandaj lingvoj (Hungario)**, 9**

EDE subtenu multlingvismon, tio estas uzado kaj instruado de ĉiuj lingvoj, aparte tiuj de la najbaraj landoj, almenaŭ kiel pasiva kono.

22. Krei kondiĉojn lerni enlandajn najbarajn lingvojn kaj Esperanton tra la tuta edukvertikalo (en lando + Eŭropunio), **9**

23. Esperanto kiel ponto/cemento**, 8**

En la programo, esperanto estu prezentita kiel ponto inter civitanoj kaj cemento de la eŭropa civitaneco.

24. Ŝtata agado en strategiaj sektoroj, **8**

Estis proponite, ke EDE postulu ke strategiaj sektoroj, kiel financo, sano kaj energio estu almenaŭ parte publikaj kaj tiel evitonte tutan frostiĝon dum krizaj momentoj .

25. Paraleligo kun naturprotektantaj partioj (Hungario), **8**

Estis proponite, ke en la programo ni komparu nin al ekologiistoj, kiuj estis komence eta partio antaŭ ol fariĝi gravaj kaj dissemi siajn ideojn en ĉiujn partiojn. Tiel oni elvokas respekton al niaj ideoj, ĉar neniu scias kiel evoluos ili en la estonteco.

26. Entemigo kontraŭ antaŭjuĝoj/miskredoj kaj tabuo, 8

27. Bridi la ekonomion, **7**

Oni reguligu la ekonomion tiel, ke ĝi utilu al homoj kaj ne nur al monprofitego. Oni devas pensi pri tiu demando mondskale kaj alidirektigi ekonomion internaciskale. Ni estas por libera ekonomio, sed kiel eblas ke internaciaj firmaoj estu pli potencaj ol ŝtatoj?

28. Popolvoĉdonado (Germanio), 7

Eĉ se partoprenintoj de la semajnfino apogas reprezentivan demokration, ni opinias, ke popolvoĉdonadon oni devus plifortigi. Estas grave formuli au diskuti pri iu problemo, kiel ekzemple « Ĉu havi komunan konstitucion? ». Devas esti interparolo kun la popolo. Oni devas pritrakti gravajn aferojn nur en parlamento kaj en registaro. Estas notinde, ke la lisbona traktato ebligos popol-iniciatajn referendumojn. Eŭropparlamenta komisiono estas priskribanta la kondiĉojn por tio. Fakte la civitana iniciato laŭ la trakato ne estos decidpova. Temos pri trudo de tagordo al la komisiono. La celo estas debatigi la instancojn, kiuj silentigas aŭ ne priatentas iun punkton. Temas pri tio, peli debaton en la parlamentan demokration. Temos

pri ia apelacio de la civitanoj al la instancoj sed ne estas vere rekta demokratio.

29. Krei statuson de eŭropaj asocio, sindikato, firmao kaj partio (Francio), **7**
Malfeliĉe nun ne ekzistas statuso de europa asocio, sindikato, firmao aŭ partio. Krei tian statuson apud la aliaj naciaj jam ekzistantaj ebligus antaŭenigi eŭropan civitanecon, demokration kaj konscion.

30. Socialmodelo per modera sed pragmatika maldekstro (Hispanio), **5**
Nia baza socia modelo estas socidemokratia, en la vera senco de la kreskanta konstruado de la socialismo. Ni proponas gravajn rolojn al ŝtato. Se la povo devenas de la Popolo, la ŝtato, kiel protagonisto de tiu povo devas agi al servo de tiu popolo sed servi ne nur per mastrumado sed per aktiva agado, eĉ ekonomie, kiam privataj firmaoj kiel bankoj, ne plenumos siajn devojn. Ni ankaŭ postulas alian gravan rolon de la ŝtato; instigi la kreadon de firmaoj , kiam la iniciatintoj estas en malforta situacio. Tiam ŝtato devos instigi socialan kaj ekonomian kreadon. La proponinto de tiu punkto ŝatus ke EDE havu pozicion iomete maldekstran.

31. Kiel krucenigmoj au sudokuo 10 minutoj tage post kelkaj jaroj « simplaj » civitanoj povus komuniki transnacie (Hungario), **0**
Tio estas propono por aperigi ekzemple ĉe propagandiloj: tiel facile, kiel vi ludas krucenigmojn au sudukon 10 minutojn tage, lernu lude esperanton kaj vi povos komuniki transnacie.

## 7.) Ĉu kandidatiĝi por aliaj balotoj ol la eŭropaj?

Demando stariĝinta estas tiu, ĉu EDE kandidatiĝu por aliaj balotoj ol la eŭropaj. En Francio, EDE ne malpermesas al individuoj kandidatiĝi en tiu kazo menciante, ke ili ankaŭ apartenas al EDE, sed EDE-Francio ne akceptas, ke ili kandidatiĝu sub oficiala EDE-ŝildo. Pola partopreninto sciigis sian deziron, ke EDE batalu dum municipaj, regionaj kaj landaj balotoj kaj ne sola, sed koalicie kun aliaj politikaj fortoj. Laŭ li, oni tiel havos pli da ŝanco esti elektitaj en urba aŭ alispeca parlamento. Inter la balotoj, laŭ li, oni batalu ĉefe nur por esperanto. Hungara kaj germana partoprenanto opinias, ke la federacio ne povas decidi pri tio. Hungaro aldonis, ke li estus iom kontraŭ partopreno en aliaj balotoj ol eŭropaj aŭ nur koalicie kaj sen uzi la nomon de EDE.

## 8.) Diversaj aferoj

Kiel prezenti niajn ideojn

Estis plurfoje redirita dum la semajnfino, ke oni ne prezentu niajn ideojn, kvazaŭ ni ŝatus trudi ilin al la socio. Ni devas esprimi niajn ideojn iel pli demokratie kaj singarde: ni ne nepre antaŭdiru ke demokratie EU preferu ĝuste niajn solvojn, sed ĝi devas ebligi evoluon kaj evoluigon de kondiĉoj favoraj al niaj solvoj. Demokratio ebligu starigi la kondiĉojn por ke iam ni povu atingi kion ni proponas. Unua gajno estus ke la instancoj traktu niajn opiniojn, ne ke ili apliku ilin.

Pri eŭropa identeco

Ne ĉiujn partoprenintojn oni sondis pri tio, sed ŝajne, plejparto ne konsentas ke esperanto estu konsiderata kiel identiga lingvo de EU nek ke ekzistas europa identeco. Identecon oni povas trudi al neniu. Ne eblas dekreti sentu vin eŭropa! Kaj eĉ se vi sentas vin eŭropano, vi povas senti vin eŭropano diversmaniere. Homoj ne havos la saman difinon de sia eŭropaneco kaj ne ekzistas nur unu koncepto pri eŭropaneco. Homoj rajtu elekti kaj mem konstrui sian identecon. Iu povas lerni la hungaran kaj senti sin aparte ligita kun Hungario, mi sentas min vegetarano... Estis dirite de partoprenanto « Eŭropan konscion ni ĉiuj bezonas sed eŭropan identecon ni ne bezonas, ĉar la neceso ne ekzistas ». Anstataŭ paroli pri eŭropa identeco, estus pli interese paroli pri eŭropa civitaneco. Pri tio, partoprenanto tamen diris, ke oni subkomprenas la volon ideologie homogenigi kaj se tiun volon ni ne havas, sufiĉus simple atingi jurkonscion de la civitanoj kaj partoprenantoj de la tuta socia vivo de Eŭropa Unio kaj internacian demokratecon: juran konscion kaj jurajn kondiĉojn.

Pri internacia demokratio

Interesa kontribuo de partoprenanto, kiu emfazis kiom EDE estas la partio de internacia demokratio. Pri internacia demokratio, tre malmultaj homoj konscias, kaj ĝuste en EDE, per esperanto, eblas disvolvi tiun konscion, kion faras neniu alia partio.

« La politika forto de EDE, estas la aktualeco de la problemoj, kiujn ni priparolas. Tiuj problemoj estas tutmondaj kaj flankefikojn de ili eblas konkrete sperti en EU. Kaj tiuj problemoj estas la demokratia problemo, la internacia demokratio kiu evoluas. Ni povas science montri, kiel disvolviĝas la internacia demokratio en la mondo. Ĉar antaŭe, ni ne havis tiun situacion, kiun ni nun havas. Kaj tiu situacio en EU estas tute nova. Tiun ni neniam antaŭe havis en la historio. Kaj ni ne havas tiun sperton. Kaj kio nun okazas, tio estas necesa. Ankaŭ se ne sukcesas nun EU, eble denove ekzistos naciaj ŝtatoj, sed tio ne povos longe daŭri. Eŭropo devas kuniĝi. Kaj en tiu procezo kiun ni havas en EDE, ni restas aktualaj kaj ni povas arigi ĉiam pli da homoj, kiuj nin komprenas. Malmultaj homoj komprenas kion ni volas nun, sed estos ĉiam pli. La nunaj politikistoj, kiuj lernis politikon en sia nacia lernejo ne komprenas tion. Ili estas en la eŭropa parlamento, ili ne komprenas kio estas internacieco, ili ne komprenas tiun inter-econ, popolinter-econ. Estas tute nova afero, ke ni komprenas tion en la realeco. Kiel ideo, tio jam estis en la filozofio, ankaŭ en la artoj de 200 jaroj, sed tio nun fakte en eŭropo montriĝas, ne estas nur ideo, ĉi tie kaj nun montriĝas. Kaj tion ni celas ĉe EDE. »

# KROMAJ DOKUMENTOJ

## Guillem Gómez Blanch

“Serĉo de politika modelo per Kontinento en krizo “

## Fabien Tschudy

“Ĉu nova tegmento por la EDE-programo?”

# Teksto de Guillem Gómez Blanch

Serĉo de politika modelo per Kontinento en krizo
20.6.2010
Alcasser 23.6.2010
Alsoörs 26.6.2010
La nuna socia kaj politika krizo kiu skuas Eŭropon, igas multajn homojn demandi sin pri nova politika modelo, permesanta superi tiun krizon per evoluo de la socio.

**De kie ni venas**
Por analizi, kaj politike kaj ekonomie, la krizon ni devas retroiri almenaŭ ĝis la finaj jaroj de la 60a jardeko de la pasinta jarcento, kiam iel elĉerpiĝis modeloj kiuj sekvis la fino de la 2a Mondmilito,kaj al orienta kaj al okcidenta Eŭropo. Tiam la okcidentaj eŭropaj registaroj urĝe kreis allogan modelon kiu ebligis la maldekstrajn idearojn (tiam tre fortaj) esti senefikaj. Sed en tiuj 56/70aj jaroj oni hezitis pri tiuj politikoj (Hungarujo 1956, Majo 1968, okazintaĵoj en tiama Ĉeĥoslovakio..), anoncante la finon de epoko kiu okazis samtempe ol la petrolea krizo en la jaro 1973. La komunisma maldekstro ekkomencis sian "eurokomunisman" evoluon sen perdi sian autoritaran mienon.
Verŝajne grandega kvanto da mono (dolaroj) estis tiam bezonata (kaj generata), por superi la konsekvencojn de la mondmilito, (Marshall plano, ktp.) tiel ke ekvivalenco inter dolaro kaj oro ne pli entenis kaj fine ambaŭ valoroj disiĝis. Tiam klare disiĝis financkapitalismo kaj realkapitalismo; ĝis la nuntempo ilia distanco nur kreskis, ankaŭ helpe de modernaj komputikaj rimedoj.
La eŭropa politika panoramo forte ŝanĝiĝis pro la falo de la muro de Berlino en 1989. Plifortiĝis la krizo de la eŭropa maldekstro; "socialdemokratio" iĝis liberala, laŭ la modo de la epoko, ĉar socialismo aspektis erara al multaj homoj.
Tiam la plej rigora kapitalismo havis pli kaj pli liberan kampon por agi sen malamikoj nek socio nek ideologio. Senkontrola kreskado de la financkapitalismo, klasikaj bankoj kaj malnovaj investsocietoj donis rezultojn multpli superaj ol la gajnoj de la reala kapitalo, streĉinte la politikan kaj la socialan vivon. La supervivado de la "bonstata Eŭropo" estis nur ebla per la proceso de eŭropa konstruo.
Do, grava elemento de eŭropa identeco estas tiu bonstata societo rezultigita de ĉio ĉi. Kompreneble, eŭropanoj elportis el la pasinteco multajn komunajn valorojn, kiuj estas rezultoj de sia komuna historio inter kiuj elstaras homaj rajtoj, laikeco, libera kritiko, hejmlandaj rajtoj kaj socijusteca amo. Tre grava estas la rifuzo de la totalismo kaj faŝista kaj komunista. Ni ne pli longe pritraktu tion ĉi tie.
Ni devas ankaŭ paroli pri evoluo de lingvaj rajtoj. Dum tiuj jaroj daŭris la lingvopremo al lingvoj kiaj la kataluna, la okcitana kaj, ĝenerale lingvoj ne oficialaj. Aliflanke, la angla pli kaj pli regadis kiel lingvo de aferoj, de scienco, de teĥniko…de povo. Kvankam en la Orienta Eŭropo rusa lingvo forte premas naciajn lingvojn.

**Kie ni troviĝas**
Ni alvenas al akra konkludo ke la vera reala reganta povo estas plutokratio, kiu igis faŝismon kontraŭ la komunismo; bonstata sistemo per alogi pli ol maldekstra kaj komunismo; liberalkapitalismo, kiam maldekstra ne pli minacas kapitalismon. Sed jen realeco!.
La nuna situacio estas tre malbona en la aspektoj pri ekonomio, politiko kaj lingvaj rajtoj.
Ekonomie, eŭropa popolo suferas atakojn de du ĉefaj originoj: unuflanke ni havas la "klasikajn" bankojn; aliaflanke ni havas la investsocietojn nome "liberaj fondusoj" (anglalingve hedge funds), precipe de Britio kaj Usono.
Bankoj okazigis privatajn kaj publikajn ŝuldojn. En sia momento, ili demandis helpon al ŝtatoj; kiam ŝtatoj helpis iĝis malfortaj kaj tiel, la bankoj diras al ŝtatoj kion ili devas fari. Bankoj regas la ŝtatojn kaj politikistojn; bankoj trompas la popolon - jen demokratio!: la momento de la fino de la "bonstata ŝtato" estas, laŭ ili, tuja. Delonge la eŭropaj bankoj; la Centra Eŭropa Banko ("gvidata" ĉefe de germanaj bankoj), la Internacia Mon-fonduso esprimis sian deziron malgrandigi la sociajn rajtojn en Eŭropa Unio.
La "liberaj fondusoj" venas al sama rezulto, per malsama vojo, t.e. per spekulado en borso kaj ŝtat-ŝuldo, precipe. Atakoj iras ĉefe al socidemokrataj ŝtatoj. Tio ĉi okazigas la konatan krizan etoson.

La celo tie estas ankaŭ eviti la disvastig de la eŭropa modelo ekstere, kiel ekzemple en Usono, Ĉinio aŭ Barato.
Rezulte de tiu krizo, multaj homoj perdis siajn laborpostenojn kaŭ devas redukti sian viv-nivelon. Sencerteco, deprimo kaj senkuraĝo kreskadas. Ĉu ĝi fariĝos ribelo, paniko aŭ ambaŭ?. Neniu scias. Ksenofobio kaj faŝismo kreskas.
Du ĉefaj tendencoj aperas: ŝpari kaj pagi bankajn ŝuldojn (strangajn ŝuldojn) aŭ investi kaj faciligi kreadon de laboraj postenoj.
La neceso de eŭropa perspektivo estas hela. Estas naive pensi ke izolita lando povus sole batali kontraŭ la krizo. Registaroj devas agi kune, kadre de Eŭropa Unio; politikaj partioj kaj eĉ sindikatoj devas/devos kunordigi siajn klopodojn pri tio.

**Kion ni proponas**
Ni devus serĉi nian modelon profundiĝante en nia historio, rilate al rezultoj, kaj tiuj bonaj kaj tiuj malbonaj. Liberalismo alportis kapitalismon al la nuna sovaĝa realo. Komunismo ne sukcesis konstrui socialisman mondon per diktatura vojo, sen libero, sen travideblo. Kaj bedaŭrinde sen travideblo koruptado kreskas. Nov-konservativo estas simple malnovaj malmolaj kapitalismaj ideoj en novaj tempoj.
Jen ni bezonas **demokratecon** en societo kaj en partioj; kaj ankaŭ **travideblecon** en ĵurnaloj, radio, televido, ktp. Bedaurinde, eĉ se la demokrateco de la parlamentara sistemo ne estas tuta malbona, vera demokratio estas iomete tia fikcio,kia aparte la balota tago, ĉiam la "merkatoj" regas.
Certe ni bezonas **respekton al homaj ratoj,** rolantaj kiel limoj al sociaj kaj politikaj agadoj. Ankaŭ ni postulas **hejmlandajn rajtojn.**
Ni proponas **eŭropan politikan / perspektivan agadon** favora al la popolo kaj kontraŭ la detruado de la minimumaj indaj vivkondiĉoj.
Ni proponas ankaŭ esti favoraj al **la konstruado de Eŭropa Unio** kiel politika strukturo kiu brakumos la ŝtatojn kaj landojn pere de la **federista principo**.
Nia baza socia modelo estas **socidemokratia,** en la vera senso de la kreskanta konstruado de la socialismo kune kun demokratio kaj travidebleco.
Ni postulas **leĝevoluon**, t.e.: ŝanĝoj okazu kune kun leĝoj, kaj leĝoj estu ŝanĝotaj per politika agado.
Kiel pontolingvo inter eŭropanoj, ni postulas **Esperanton.** Tiel nia movado klopodos per ĝia lernado kaj ĝia adopto kiel **kroma, kompletiga, ĉefa lingvo** en urboj, landoj, ŝtatoj kaj komprenebre eŭropunia registaro.
La politikaj celoj de **EDE ne limiĝu al eŭropuniaj balotoj**, sed al ĉiuj ajnaj balotoj kie partopreno indas, ekzemple municipaj balotoj.
Ni proponas **gravajn rolojn al ŝtato**. Se la povo devenas de la Popolo, la ŝtato, kiel protagonisto de tiu povo devas agi al servo de tiu popolo sed servi ne nur per mastrumado sed per aktiva agado, eĉ ekonomie, kiam privataj firmaoj kiel bankoj, ne plenumos siajn devojn.
Strategiaj sektoroj, kiel financo, sano kaj energio devus esti almenaŭ parte publikaj kaj tiel eviti totalan haltiĝon en krizaj momentoj .
Ni ankaŭ postulas alian gravan rolon de la ŝtato; instigi la kreadon de firmaoj , kiam la iniciatintoj estas en malforta situacio. Tiam **ŝtato devos instigi socialan kaj ekonomian kreadon.**

Tiu **miksta kapitalismo** kie kapitalismaj kaj socialismaj elementoj kunvivus, ne estas malproksima celo. Tiu modelo, pli stabila kaj justa ol la nuntempa modelo, povas evolui kun la homoj, ĉar progreso ĝis pli socialismaj formoj nur eblas se la homoj estas preparitaj. Alikaze, la modelo ne funkcias kaj nur frustiĝo aperas.
Hodiaŭ, nia modelo serĉas iun "fantomon kiu transiras Eŭropon"; sed tiu ne estas la spektro kiun la Komunista Manifesto alvokis sed la **sistemo kiu strukturos la plej bonan el tiuj pasintaj modeloj kaj la plej taŭgajn solvojn el la nunaj problemoj**, kiuj ebligas al ni kaj al venontaj generacioj vivi kune, en **justa kaj daŭripova socia evoluado**.

Guillem Gómez Blanch
Junio 2010

# Teksto de Fabien Tschudy

Mi vidas plurajn celojn al la agado de EDE. La unua estas eble apenaŭ menciinda, ĉar ne vere temas pri nia celo. Tiu estus havi deputitojn en la parlamento. Kvankam pro kandidatiĝo estas nepre eĉ senvole iom de tiu ideo, almenaŭ en la kapo de la ekstera publiko, EDE ne vere strebas al tio, aparte konsiderante siajn fortojn. La du aliaj celoj estas ja pli pripensindaj: ili estas kontribui al ekesto de niaj ideoj unuflanke en la kapo de la ĝenerala publiko, aliflanke en la kapo de la kutimaj ĉiukaze aliaj partioj. Por tion sukcesi, ni devas esti laŭ mi kredindaj, ne ekstremaj en nia programo, esti realismaj kaj ne tro malneŭtralaj ekster nia idekampo. Krom tio, ni devas havi komunik- kapablojn kaj -kompetencojn kaj aspekti profesiecaj. Por esti allogaj kaj aŭskultataj, ni ankaŭ devas kapabli klarigi vizion de Eŭropa Unio.

<u>Politikistoj havas problemojn kun esperanto.</u>

- Iuj politikistoj havas antaŭjuĝojn. Kelkaj eĉ ne volas aŭdi pri esperanto ĉar jam definitive taksis ĝin frenezaĵo, stultaĵo, ne vera lingvo...
- Iuj politikistoj ne scias sufiĉe pri esperanto. Ili scias iomete, sed ne sufiĉe por debati pri la temo ĉar ili ne havas konkretajn konojn. Eĉ se ili apogus la lingvon, ili ne kuraĝos paroli antaŭ publiko prie, krom se ili ŝatas diri stultaĵojn. Krome, ili eĉ eble en kapablus defendi la ideon pro manko da argumenta kaj kona fono.
- Fine estas tiuj politikistoj, kiuj apogus la lingvon kaj konus bone la temon (ĉu tia politikisto ekzistas) sed ankaŭ ne kuraĝos paroli, ĉar simple la ĝenerala publiko ne interesiĝas pri la ideo.

Por interesigi politikistojn pri niaj ideoj, estas du eblecoj:
-ĉu rekte iri al ili por ilin konvinki
-ĉu konvinki iliajn voĉdonantojn, tiel ke politikistoj ekinteresiĝu pro voĉakiremo

EDE rolu favore al ambaŭ tiuj punktoj: famigi ideojn, kiuj de komence ne estas allogaj kaj seriozigi tiujn ideojn antaŭ la okuloj de la publiko.

Por ke esperanto estu alloga, oni ne devas prezenti ĝin por si mem, oni ne reuzu la samajn argumentojn, kiujn uzas kutima esperanto asocio: esperanto estas bona rimedo por vojaĝi, esperanto estas facila lingvo, esperanto estas la lingvo de paco... sed enpaku ĝin en alian pakaĵon. Tiu pakaĵo, por esti alloga devas:

-enhavi novajn ideojn (esperanto estas unu el ili)
-esti facile komunikebla
-ĝi prezentu esperanton kiel rimedon sed nepre ne kiel celon.

Mi mem spertis tion kun ĵurnalistoj. La unuajn intervjuojn, kiam mi parolis pri esperanto menciante egalrajtecon, lernofaciligan rolon..., la temo aperis iom seka al ili. EDE ne prezentu esperanton el lingva vidpunkto sed el politika vidpunkto kaj EDE ne estas kaj ne aperu kiel esperantista partio.

Studante la francan kaj germanan balotprogramon, oni vidas komunan nocion, kiu estas Eŭropa civitaneco. El mia vidpunkto, oni povas el tiu nocio deklinacii nian tutan programon. Jen tegmento por nia programo: eŭropa civitaneco. La ĉefcelo de EDE estus "starigi kondiĉojn favorajn al apero de eŭropa civitaneco" kaj en tiu ideo aparte ĉeestas esperanto, ĉar por ke estu eŭropa civitaneco, oni ja bezonas komunan lingvon. Eŭropa civitaneco ne estu nur po unu fojo en 5 jaroj, kiam oni balotas eŭropajn parlamentanojn, ĝi estu ĉiutaga kaj tion oni konstruu. Estas ja vizio de Eŭropo, kiun ne proponas aliaj partioj.